

Tagiĝo 29

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR - eldonas: Dům Osvěty, odbor Esperanto
redaktas: Kuzník Jaroslav, Rooseveltova 17, Opava 1956/II

REGIONA KUNVENO JUNULARA

kaj Nikolaa vespero en Praha

Junularo de la Esperantista klubo en Praha aranĝis dimanĉe la 27-an de novembro en la kunvenejo de EKP sukcesan regionan kunvenon de la Junularo kiun partoprenis 50 personoj el 19 lokoj de 5 regionoj. Praha, Ĉ. Budějovice, Plzeň, Hradec Králové, Pardubice, Jihlava, Brno, Ostrava. La kunvenon gvidis la regiona delegito VI. Novotný. Salutojn kaj bondezirojn diris s-ano J. Šustr en la nomo de esp.klubo en Praha. J. Vitek en la nomo de TKKE. J. Mařík en la nomo de esp. Junularo en ĈSR. S-ano J. Šupichová salutis skribe la kunvenon. La ĉefdelegito J. Mařík diris la ĉefan referaton, en kiu li skizis nuntempan situacion de la ĝenerala movado en la popoldemokrataj landoj kaj en Sovetunio, kaj pritraktia la staton de la junulara movado en Ĉeĥoslovakio de post la lasta jarkunveno en Otrokovice. En la lastaj momentoj revigliĝis la aktiveco kaj iniciatemo en la multaj lokoj, dum en kelkaj, kie la esperantista vivo iam ekzistis restas la tasko reveki ĝin.

Raportojn pri la progresado de la junulara movado en supre nomitaj regionoj prezentis la regionaj delegitoj L. Křivánek /Ĉ.Budějovice/, J. Hořejší /Plzeň/, V. Novotný /Praha-K.Vary/, Ústí nad L./, K. Franc /Pardubice, Hr.Králové, Liberec/, O. Kaláb /Brno, Jihlava/, Dr. Kočvara /Ostrava, Gottwaldov/.

Dro Pitlík emfazis en la diskuto, ke nun estas jam tempo ne por peti, sed por ataki la ĝeneralan publikon en la afero de Esperanto. En tio necesas kunlaboron de la junularo kun malnovaj elstaraj esperantistoj, la unua posedas entuziasmon kaj batalemon, la aliaj sciojn kaj spertojn. Oni akceptis lian sugeston kaj elektis "konsilantojn de la junularo" /titolo diskutita sed ankoraŭ ne fiksita/: Dro A.Pitlík, Dro T. , Punpr, J. Šustr /EKP/, J. Vitek /TKKE/.

/Permesu ke ni ne entobigu la ŝerce direktitan rimarkigon de s. Šustr pri tiu titolo, kiu elvokas sinceran gajecon: "HONORAN JUNULON"/. Tiuj ĉi s-anoj jam pruvis praktike sian dankindan helpon. D-ro Pitlík samtempe donacis al Junulara kaso konsiderindan sumon Kčs 100,--. Ni alte taksas tiun ĉi iniciaton.- Laŭ raporto de la kultura delegito V. Novobilský, la novan literatur- kaj traduk-konkurson junularan partoprenis multaj grupoj. Laŭnombre la unuaj tri estas : Plzeň, Brno, Praha. En diskuto pri neceso de lernoblibroj por infanoj a-ano Raška raportis ke li jam laboras en grupo kiu kompilas materialon por tiu celo.

Post diskuto, kiu daŭris pli ol unu horon la kunveno estis fermita per kantado de la ESPERO. Pluaj delegitoj konktete esprimis la manieron laŭ kiu ili plenumos la peton de la Ĉefdelegito raporti la ĵus enĉerpitan entuziasmon ak siaj grupoj kaj lokoj.

La regionan kunvenon antaŭiris sabate Nikolaa vespero aranĝita en la palaco Fenix, kiun partoprenis pli ol 100 personoj el dudeko da lokoj. Mallongan artprogramon seriozan sekvis gaja programo, finita per disdono de donacoj de "Sta Nikolao" al "bonkonduktaj samideanoj". En la efektivigo de la Programoj partoprenis multaj junularanoj el Praha. Vigla danco kun bonega muziko de la dancorkestro de ZK, finis je la 2-a matene tiun ĉi ĉarman societatan aranĝon.

-jm-

El nia grupa vivo

La aktiveco de la lokaj rondetoj dum novembro kaj decembro 1955, kiel ĝin respegulas la raportoj de reg. delegitoj aspektas jene:

I. Reg. Praha, K. Vary, Ústí n/L. (RD V. Novotný)

Praha: ĉiumarde normalaj kunvenoj kun pliperfektigaj lecionoj, kaj ludoj societaj. Lecionoj en du grupetoj gvidas Novobilský kaj Pastor. Kvar membroj ĉeestis la reg. kunvenon en Ostrava kaj Novobilský prelegis en la seminario pri la Esp. literaturo, kaj en la kunveno pri la situacio de la movado.

4.11. la kunveno estis dediĉita al bulgara gasto

Prof. Canko Murgin por informi lin pri la historio kaj aktuala stato de junulara movado en ĈSR. 26.-27.11. Junularo Praha aranĝas sukcese Nikolaan kaj societatan vesperon kaj regionan kunvenon kun partopreno el dudeko da lokoj.

Kurso de E. por blinduloj estas gvidata de V. Novotný en la Deyl-Instituto po 1 leciono semajne de 13.12.55 kun 10 partoprenantoj. R. Kudla helpas plivariigi la lecionojn. Enkondukan ĉeĥan prelegon faris V. Echtner.

K. Vary: Junularan rondeton ĉe Rudý Koutek Lázeňských domů fondis 1.10.55 Vl. Horák, kiel prezidanto /13 mambroj/ Vitrino en Žukov-strato kun propaganda materialo. La Rondeton salutis E. Bokarev el Lingvosciencia Instituto, Moskvo.

Most: Elementan kurson kun 15 partoprenantoj komencis Caklová laŭ Ĉe-metodo, post afiŝa propagando farita de Ministra klubo. Kunvenoj marde 19 = 21 h, kun perfektigaj lecionoj kaj varia programo. La Minista Klubo plene subtenas. Sed laŭ posta sciigo la Minista Klubo intencas nuligi la Esp.rondeton. Ni intervenis pere de TKKE.

II. Reg. Ĉ. Budějovice /RD – Křivánek, Písek/

La sendita raporto skizas ĝenerale la situacion dum la pasinta jaro:

La grundo en tiu regiono ŝajne ne volas kreskigi la semitajn semojn. La posteno de la RD ne estas enviinda kaj li do meritas nian dankon, ĉar li malgraŭ ĉio persistas. Tamen ni ne povas kredi, ke ne ekzistas en tiu regiono sufiĉe junaj esperantistoj, kiuj konsistigus reton de la kunlaborantoj, helpantaj al la RD. Junaj samideanoj, la tempo vin vokas! Aliĝu ĉe s-ano Libor Křivánek.

En Sudbohemia nun ne ekzistas grupo efektive Junulara. Tamen la situacio ne estas tiel malbona kiel ĝi ŝajnis. Junularo ne mankas, ĝi nur kuniĝis kun la pliaĝuloj por ne disrompi la fortojn per apartiĝo. Ununura loko / kun fondebla kaj agadkapabla junularo rondeto estas Ĉ. Budějovice, kie s-ano Nymburský serĉas junularan klubejon. - Kursoj estis komencitaj dum aŭtuno (ne speciale junularaj) en Ĉ. Budějovice (inĝ. Krajíc), Netolice (Nymburský) el Ĉ. Budějovice, Strakonice (Blažek).

Písek: Tiu ĉi grupo suferas jam longe pro la translokiĝemo de la anoj plej parte studentoj, kiuj foriras post la studofino. La RD gvidas kurson anoncitan per belgusta flugfolio kaj per urba disaŭdigo kiu allogis nur kvar kursanojn. La grupo planas daŭran propagandon per montrofenestroj, ĉar sperta s-ano V. Jindřich el K. Vary funkcias nun en Vráž kaj volas helpi en la afero - La unua helpanto ĝis nun, kiu anoncis sin al la RD. Bona sukceso de RD: La decembra "Písecký kalendář kultury a oddechu" enpresis du sciigojn pri aranĝoj de la loka grupo:

"Libertempo en Bulgario" (Křivánek) kaj "Elementaj kursoj de Esperanto". - La loka grupo kunvenas regule vendrede.

III. Regiono Plzeň. (RD J. Hořejší)

La junularo kunvenas vendrede en ejo ĝis nun malkonvena. /6 - 9 personoj/. Programo perfektiga kaj distra. Komencantojn oni ne havas. Kulíšek partoprenis la reg. kunv. en Ostrava, - Ses membroj la kunvenon en Praha. Kolektiva partopreno al prelego de C. Murgin. La plzena grupo venkis en la junulara konkurso aranĝita per Tagiĝo.

Cheb: Jaroslav Klement el Plzeň, nun lernejestro en Všeboř ap. CH., eklaboris por fondi kurson de lernejoj. Volas revivigi la movadon en Cheb.

Rokycany: S-ano Kočvara eksoldatiĝis. Nu, ĉu vi jam komencis fefosi vian sulkon? Rememoru vian antaŭan viklecon. Ni atendas vian informon.

IV. Pardubice, Liberec, Hr. Králové

(RD. K. Franc, Pardubice)

Pardubice: Amika vespero 8.12. aranĝita por interkonatiĝo de la komencantoj kaj malnovaj anoj kun programo, nikola disdono de donacoj kaj danco ĝis la 2-a horo. En la preparo harmonie kunlaboris ambaŭ elementoj kaj la vespero plaĉis al ĉiuj. La kunlaboro fine estis komencita, nun ĉiuj funkciuloj laboru respondece kaj entuziasme! - La kursoj elementa kaj perfertiga A kaj B, bone progresas, en A ĝis nun 14 lecionoj Ĉe-metodaj el la planitaj 25 (duhoraj) - La RD delegito alvokis partopreni intergrupan konkurson pri varbado por Tagiĝo, proponitan de Ostrava.

Lanškroun: Ĉiusemajna kurso kun meznombro 10 partoprenantoj, gvidata de s-ano Kobza laŭ Krajíc lernolibro. La grupa programo devas esti ofte ŝanĝata, ĉar la pli aĝaj s-anoj ne venas, sed venas la 9-10 – jaraj!

Chrudim, Hr. Králové: raporto ne venis, Jablonné n/Orlicí – s-ano Verner ne povas raporti raporti pro malsano.

V. Regiono Brno, Jihlava (RD O. Kaláb)

Brno: La tuta junularo fordonis sin al la preparoj de tutvespera programo en la EK. Kaj ili ĉiuj (18) prezentis ĝin sukcese 29.11. sub la devizo: „Ĝoje kaj serioze“. J. Cink prezentis 18.10. en EK tutvesperan programon: „Lekcio el meteorologio“. Por kunveno kun Bulgara gastulo C. Murgin venis s-anoj el 4 lernejoj. J. Werner preparis prelegon en EK: "Matematika leciono" aŭ "pri kompatindaj studentoj" O.Kaláb 27.12.: "La bela kaj interesa mondo", 4 membroj partoprenis la seminarion en Ostrava, unu membro - la reg.kunvenon en Praha. Cink gvidas la C-kurson, la D-kurso provizose ĉesis. Nikolaan vesperon en EK aranĝis ankaŭ la Junularo. Jarkunveno de la Junularo 16.12. elektis novan estraron kaj planis agadon por 1956. Prez. estas Jan Werner, delegito: Fr. Hort, Šlapanice u Brna, Malinovského 55.

Kroměříž: Jam fine aŭdiĝis. S-ano Gatemayer komencis en novembro elementan kurson kun 12 partoprenantoj. Perfektiga kurso kun 10 partoprenantoj malfermita samtempe. Oni kolektive ekskursas, vizitas teatron kaj estradprogramojn, kaj vizitis la maŝinekspozicion en Brno. (Sed kial la rondeto ne avizis la Brnanojn pri sia veno?).

Ili partoprenis prelegon de C. Murgin en Otrokovice kaj kelkaj partoprenis la reg. kunvenon en Praha. Antaŭ la alveno de tiu ĉi informo ni dubis ĉu ankoraŭ iu el s-anoj el Kroměříž vivas. Do des pli miriga estis la informo kun la enhavo: La ministerio de kulturo ricevis petskribon de la rondeto el Kroměříž pri permeso partopreni la UK en Kopenhago. Kun rezulto kompreneble negativa. S-anoj el Kroměříž: iom pli da sento pri kolektivo kaj pli da solidareco ne malutilos. Por partizaneaj agoj ne estas tempo nun.

Vi plendas al la RD pri "nesufiĉa informa servo en Praha". Pri kia servo vi revas?
Krom tio Praha ĝis nun opiniis pro via ĉiama silento, ke neniu esp. vivo ekzistas en Kroměříž.

Svitavy: Kunvenoj okazas regule ĉiusemajne. Kursoj dufoje semajne kun 23 partoprenantoj. 80% de la kursanoj jam korespondas kun eksterlando. 16.12. finiĝis la elementa kurso kun 22 novaj esperantistoj - lingvonivelo - bona.

20.12. Zamenhofa vespero kun disdono de atestoj al kursanoj. La gazeto: Za novou vesnici Nro 48 raportis pri ĝi. Kolektiva partopreno en kultura vespero de ZK Svitap. - Laŭinde laboranta grupo.

Třebíč: 3 kursoj, malfermitaj en oktobro (elementa perfektiga, konverscia). Finiĝis sukcese en decembro kun 97% partopreno. La klubejo kaj biblioteko rearanĝitaj, du estrarkunvenoj, nova prezidanto (zd.Brož), plibonigo en kultura aktiveco planita por 1956. Oni aranĝis Nikolaan kaj Kristfestan vesperon kaj kelkajn ekskursojn. Dum printempo oni eble aranĝos konferencon en Třebíč..

Žďár nad/Sáz: La membroj perfektigas en la lingvo dum regulaj kunvenoj. Ĉiuj kursoj bone progresis escepte la elementa - meznombra partopreno 70%. Esperanto publike propagandata, du anoj partoprenis la Tagiĝo-konkurson. La uzina gazeto: "Žár Vysočiny" estis misuzita de occidentalisto por kalumnioj kaj mensogoj pri Esperanto kaj por propagando de occidental (interlingue). La rondeto, la ĉefdelegito k.a. sendis trafajn respondojn kaj la gazeto enpresis la respondon sed ne kompletan. La rondeto preparas do grandan E-ekspozicion, kiel respondon al la artikolo de la Occidentalisto /Ondráček, ano de la redakcia komitato /kiun ni defiis aranĝi ekspozicion pri Occidental. Helpu nin per Esp.materiale - 10 kontribuaĵoj senditaj al la konkurso da "Tagiĝo".

VI. Regiono Olomouc

Kvankam la RD s-ano Fabián propravole transprenis sian funkcion ankaŭ por la nuna jaro li raportis ĝis nun pri nenio. Sendu al mi almenaŭ resuman raporton pri la lasta duonjaro!!

VIII. Regiono Ostrava - Gottwaldov (RD Kočvara)

"Ne estu skribavaraj kaj ĉiun agon tuj raportu al mi" - jen la komencaj vortoj de raporto, kiun mi ricevis post tempo sufiĉe longa la vortoj celas la klubajn delegitojn. Jes, anoncu ĉion al RD, por ke li ne ŝajnu „skribavara“ al Centrejo!

En la kadro de ZK VŽKG (ferfabriko) 4 kursoj estas gvidataj: 2 elementaj (25 partoprenantoj), gvidas s. Slaný, 15 partoprenantoj gvidas Raška/ perfektiga /12 partoprenantoj gvidas Čermák/, supera / 9 partoprenantoj - gvidas Dr. Kočvara). Post la lecionoj la kursanoj kunvenas por komuna unuhora programo /laŭdinda aranĝo/.

Pluaj kursoj: En OUPZ n-ro 11 en Ostrava-Hrabůvka kun 31 lernantoj gvidas Kočvara en sia labortempo. Esp-o havas tie trijaran tradicion. En Mariánské Hory kaj en Bohumín s-ano Slaný gvidas kursojn kun po 15 plejparte junaj anoj; En Prostřední Baudovice Schwetter gvidas kurson en nacia lernejo kun 30 infanoj - 12-14 aĝaj.

Ostrava defias ĉiujn grupojn al jena konkurso: akiri plej grandan nombron de "Tagiĝo"-abonantoj. Kiu gajnos kaj ricevos premion?!

Opava: VI. Kočvara gvidas elementan kurson kun 20 partoprenantoj. Samtempe daŭras kurso por infanoj kiu gvidas s. Matušková. Opava preparas ĉijare denove la Someran Esp. Tendaron en valo de rivero Moravice - 2 etapoj po 14 tagoj. Post foriro de kelkaj samideanoj el Opava oni atendas novan sangon el la nunaj kursoj.

Aranĝita Silvestra vespero por s-anoj el tuta regiono.

Třinec: La pure knabina junulargupo harmonie kunlaboras kun la agaj ges-anoj. La 4-an de 12. ili organizis la reg. kunvenon de Ostrava kaj Olomouc kun parolado de s. Kožený. 8.12. paroladon de

Vítek el Praha pri Finlando, 13.12. viziton al teatraĵo en Ostrava.

Vítkov: Opavano, s-ano Ŝkaŝupa sukcese varbis en lernejo por aranĝi esp. kurson, kiu estis komence de januaro malfermita kun 25 partoprenantoj. Ni esperas ke Esperanto enpenetros denove tiun ĉi urbon.

Drahotuše: Ekzistas rondeto sen interligo kun la RD. Ili sondas la terenon tie. Sendu dume la raportojn pri agado al RD en Ostrava.

La vizito de prof. C. Murgin el Sofia en Ostrava tre helpis al nia laboro. Lia publika prelego afiŝe anoncita havis grandan sukceson. Murgin parolis kun pluraj aŭtoritatuloj.

Dum diskuto kun bulgara gastulo C. Murgin, neesperantistaj funkciuloj miris pri la forteco de la loka esp. movado.

Estas konstatebla ĝenerala plivigliĝo de nia grupa vivo, precipe en la moravia parto de ĈSR. Pluraj grupoj laboras bone, iuj eĉ modele. La ceteraj devas pliaktiviĝi por aŭdigi sin en la ĝenerala junulara agado. Ni posedas bonan bildon pri la aktiveco en la tuta ĉeĥa regionaro. Nur se Olomouc aŭdigus sian voĉon. Ni scias ke ankaŭ en tiu ĉi regiono la junaj esp-istoj ne dormas. Sed kiel ni sciigu pri ilia agado, se venas neniuj raportoj!!? Se nuna regiona delegito ne posedas tempon por plenumi sian funkcion, la regiono povas delegi alian s-anon je tia posteno. La elekton ne faras la Centrejo. Ĝi nur konfirmas la elekton!

Imitindaj atentigoj, alvokoj, konsiloj kaj ordonoj aperas en cirkuleroj de la RD en Praha, Pardubice, Brno kaj Ostrava.

Plenan sukceson en harmonia disvolvado de la aktiveco de ĉiaj grupoj kaj funkciuloj en jaro 1956

deziras

J. Mařík, ĈD (15.1.1956).

Ankaŭ pri Nikolao!

La Junularo en Praha vere sukcese, aranĝo jam tradician Nikolaan amuzvesperon. Ĉefe altnivela programo entuziasmigis nin kaj multaj el ni kaptis ideon fondi junularan artkolektivon. Gajaj societaj ludoj preparis por ni maloftan spektaklon.

La dimanĉa kunveno estis bone preparita kaj havis glatan procedon. Tre plaĉis al ni, ke partoprenis la ĉefaj gvidantoj de nia movado s. Vítek kaj Pitlík. Vortoj de tiuj gastuloj pruvis, ke la Junularo en Praha harmonie kunlaboras kun la malnovaj s-anoj. Ĉiuj partoprenantoj ne nur bone amuziĝis, ili eĉ enĉerpis novan entuziasmon por daŭrigi en nia laboro.

Dr.

Slovakio raportas pri sia Esperanta vivo:

Pro la malpermeso eldoni la junularan cirkuleron Juna Voĉo petas nin s-anoj el Bratislava envicigi en Tagiĝon ankaŭ raportojn pri la E-agado en Slovakio. Ni tre volonte tion faros, kaj ni petas, sendu viajn resumajn raportojn pri via tutslovaka junulara esp. movado. Ni deziras al vi en nova jaro multan sukceson.

Bratislava: Junalara grupo povas nuntempe kunvenadi nur provizore en la Kafejo Reduta. Tamen iliaj kunvenoj havas nivelon. Ni rigardu kelkajn iliajn programojn: Problemoj de la tradukado.

Vespero dediĉita al rememoro de L.L.Zamenhof, oratoraj kursoj. Interkorespondo kun Sovetunio, pola Esperanto centrejo en Varsovio kaj Esp. klubo en Sofio. Ili direktas nian amuzon ankaŭ al kantado de diversaj kantoj, ili preparas novajn kursojn por komencantoj.

Respondo de Dro Kamarýt al la skriba saluto el regiona Junulara kunveno en Praha novembre 1955

Karaj junularanoj,

tre ĝojgis min via salutoj el regiona kunveno la 27-an de novembro. Pro du kaŭzoj:

1/ Ĝi estas unu el multaj pruvoj ke klopodoj de mia generacio liveri al la mondo helpan lingvon internacian ne ĉesis kun nia sorto forpasi. Ni vidas niajn filojn kaj nepojn fosi la sulkon. Lernantoj la majstrojn superu! Epokon atingu, kiam vortoj ne kutimaj ne estos rigardataj peko.

2/ Ankaŭ mi estas homo, kiu ŝatas sin mem io tro. Tial aŭdi, ke kunveno de s-anoj, nepre meritata honorigon, salutas aparte min, estas sperto por mi tre agrabla. Akceptu dankon kaj pardonu al mi tiun mankon; ĝi estas unu el multaj. Finfine, kiu el ni maljunuloj estas sen malvirtoj!

Estu, junaj anikoj, salutataj kaj permesu fini per ripeto de vortoj ofte dirataj sed meritantaj oftan ripetadon: La afero por kiu ni batalas estas afero granda. Ĝi ŝanĝos funde rilatojn inter homoj individuoj. Atingi tian celon oni povas nur per sistemo. Kaj per individua honesteco. Ni klopodu konservadi tiujn virtojn.

Via Stan. Kamarýt.

S-ano Chrápavý el Ostrava malgraŭ siaj 60 jaroj sentas sin juna kaj aktive partoprenas la Junularan konkurson. Por Junularo li verkis poemeton kiun ni represas:

ESPERINTO V I V U !!!

Ant. Chrápavý

Esperanto ne pereos,
vorton sekvos far',
amu ĝin - do ĉiu ano
de la junular'!

La ideon tenu alte
ĝis la lasta spir'
de la vero, bono, belo
estu pionir'!

Ĝin plenigu per espero
am' de l' juna kor',
malkonfido, malhelpaĵoj
baldaŭ estos for!

Esperanto ne pereos
sonas lasta strof',
daŭre vivos nia lingvo
nia Zamenhof.

Organiziĝas Junulara sekcio en Pollando

En Bulteno de Asocio de Esp. en Pollando, N-ro 11 en rubriko Junulara Tribuno ni legis tre interesan artikolon pri la organizado de pola Junulara movado. Pro la graveco de tiu ĉi artikolo ni parton represas el ĝi:

...En la nuna momento ni faras unuan paŝon. La ĉefa estraro AEP fondis en siaj kadroj la Junularan sekcion. Je la komenco ĝi havos formon kaj direkton de ĝia agado. La ĉefa estraro konsili la gvidadon de tiu sekcio al kolego Jerzy Uŝpienski.

..Ni ne volas komenci nian junularan laboron laŭ preta desupre organizmaniero. Ni kredas ke ĝi estos pli bona kiam estos bazita sur la opinioj kaj proponoj de la junularo mem. Tial ni invitas ĉiujn al diskuto. Plej interesaj problemoj estos publikigitaj en nia bulteno, kie ekde tiu ĉi numero estos rubriko: "Junulara Voĉo". Ni pensas, ke plej valoraj estos la proponoj bazitaj sur la propra sperto.

...La ĉefa celo de nia junulara agado estas: profundigi amikecon de la tutmonda junularo apogitan

sur la ideo de paco kaj progreso profundan scion pri la popoloj de la mondo. Por tiu ĉefa celo esperanto servos kiel plej bona eĉ ideala ilo, kaj kiel ilon ni devas ĝin propagandi.

En la nuna situacio de la E-movado en Pollando oni havas nek bezonon, nek eblecojn fari apartan Junularan organizon. Tial Junularaj sekcioj povas estiĝi nur en la kadroj de nia Asocio, kiel fakaj sekcioj ĉe la lokaj filioj.

...Komencante nian junularan laboron ni petas ankaŭ s-anojn el la popoldemokr. landoj nin helpi. Sendi al ni ĉiujn materialojn koncerne al la junulara laboro, inteŝangu kun ni viajn certe pli grandajn spertojn kun profito por nia komuna afero.

Leteroj kaj materialoj venu al: Asocio de Esperantistoj en Pollando, Ĉefa Estraro, Junulara sekcio, s-ano Uśpienski Jerzy, Warazawa, Kozia 3.

Esperanto en Sovetunio!

(Artikolo prenita el organo de MEM - Paco No 6)

La 20-an de oktobro 55 en luksa palaco sur la kajo de Neva, kie depost la Oktobra Revolucio troviĝas Leningrada Domo de Sciencistoj kun la nomo de M. Gorkij, kunvenis sciencistoj kaj studenta junularo por aŭskulti la raporton: Nuntempa stato de la problemo de internacia lingvo.

La parolanto estis nia Moskva gastoj, Dr-o de filologiaj sciencoj prof. E. A. Bokarev, vicdirektoro de la Instituto de lingvoscienco de la Sciencakademio USSR.

Estis io simila en tio ke post longa vico de jaroj, unufoje okazis kunveno de Leningradanoj, dediĉita al demandoj pri la internacia lingvo, en la muroj de domo, kies kreinto estis la granda Gorkij, unu el la amikoj de Esperanto. Ni memoru, ke ankoraŭ en la jara 1919, M. Gorkij deklaris: „Mi mem ne estas esperantisto, sed mi scias, ke tiu ĉi artefarite kreita, rapide evoluanta lingvo fariĝas tute natura fenomeno, ĉar ĝi obeas la nepran bezonon de la nuntempa homaro: trovi aŭ krei ĝenerale komprenatan lingvon.”

Tre konvinkiga, profunde bazita laŭscienca rilato kaj enhavanta abundon da brilaj vivekzemploj, la raporto de k-do Bokarev vekis la plej bonan kaj fortan impreson ĉe la aŭskultantoj.

Ni ne eraros dirante, ke la raporto elvokis ne nur grandegan intereson kaj viglan resonon, sed ankaŭ veran entuziasmon de la ĉeestantoj.

Interalie, prof. Bokarev sciigis ke en la Instituto de la lingvosciencoj en Moskva tre vigle laboras Esperanta grupo, kiu dume ne povas alpreni ĉiujn scienclaborantojn de la instituto, kiuj deziras ellerni Esperanton.

Dum la pridiskutado de la raporto, ĉiuj oratoroj diris, ke estas necesege plirapidigi la disvolvigon de porpaca esperantista laboro en nia lando, la instruadon de la lingvo, la eldonadon de literaturo ktp.

Estis elektita iniciativa grupo por organizi sekcion de internacia lingvo en la domo de Sciencistoj. Prezidanto de la grupo estas veterano de la E-movado en USSR k-do S.N.Podkaminer. Kiel sekretarion oni elektis k-don N.D. Anreev, instruanto de vietnama kaj indonezia lingvoj en Leningrada Universitato.

Do ni deziru al tiu nova ĉelo de nia movado bonan sukceson en ĝia grava laboro.

B. TOLL
USSR, Leningrad 175
Lesnoj pr.20,kv.98

La junulara esp-ista movado en la Germana DR ekvivas.

(En la sama numero de Paco p aperis tre ĝojiga raporto pri la organizo de Esp. Junularo en GDR, kiun represas.

Je la 29-an de oktobro kunvenis en Königstein junaj esp-istoj el ses urboj de GDR. La

unuan vesperon ili parolis pri la estonta Junulara movado kaj pri la internacia korespondado. Ili kantis esperantajn kantojn kaj oni lernis ankaŭ la ĉeĥan kanton: „En la junulara rond.“ /rim.de-red.:Tiun ĉi kanton enhavia nia Tagiĝo 27/ kiu tre plaĉis al germanaj junuloj.

Dimanĉe la amikoj migris al la „Zirkelstein“ ĉe Schöna apud la germana ĉeĥa landlimo. Post tio ili rekte iris al la limo, kie ili ekkantis la novlernitan kanton kun la espero, ke la ĉeĥaj amikoj aŭdus tion. La bedaŭro, ke la germanoj ne povis paroli kun la ĉeĥoj, estis tre granda.

Gisu Brosche.

Letero el Sovetunio

/Laŭ konsento de s-anino Svaĉinová el Praha ni enpresas parton el letero de k-do e. Kiselev en Tula. La letero estis skribita la 6-an de aŭgusto 1955/.

„Post kiam Esperanto ekhavis en UNO subtenon kaj aprobon, sovjetlandaj esperantistoj iom pli kuraĝigis.

Mi dufoje vizitis k-adon Bokarev kiu estas malnova esperantisto. Li estas supera scienca laboranto en Akademio de sciencistoj kaj en instituto de lingvoscienco. Li estas tre interesa kaj simpatia, bonkora homo, tre modesta scienculo. Li havas grandan propran bibliotekon, kiu konsistas plejparte el libroj specialaj je demandoj de lingvoscienco kaj ankaŭ multe da esperantaĵoj. Li havas eĉ propramanajn leterojn de nia majstro dro Zamenhof kaj esperantan skribmaŝinon. Lia filino lernas en la universitato de Lomonosov kaj ankaŭ estas esperantistino. En Moskva mi korigatis kun kelkaj geesperantistoj.

-..evidente, baldaŭ venos tempo, kiam ni havas eblecon viziti vian landon kaj preni manojn de vialandaj simpatiaj geesperantistoj. Se en nia lando Esperanto havis oficialan disvastigon, vialandaj geesperantistoj ankaŭ plivigliĝos la movadon en ĈSR. Dume, ni esperu!

Jiří Kořínek

Al vi, junaj!

Se mi vin vidas ĉe laboro,
konscias mi: jen garantio!
Kaj ĝoje batas mia koro,
ĉar multpromese sonas tio.

Mi scias, ke vi ne forlasos,
samkiel ni de jun' persistis.
Kaj eĉ se viaj jaroj pasos
kaj ili nur el pen' konsistis,

ne malfidelos vi dizerte,
ne fuĝos el sub la standardo.
Ja rekompenco venos certe
per luktopen' kaj ama ardo.

Novajoj kompilitaj de Jar. Mařík

UEA translokiĝis al Rotterdam.

La Oficejo de UEA translokiĝis el sia domo en Heronsgate /Anglujo/ al Rotterdam. La domo en Heronsgate estos vendita. La nova adreso de UEA estas: Rotterdam C Eendrachtsweg 7, Nederlando.

La nova oficejo estas tre digna kaj plene respondas al nuntempaj bezonoj de la movado. Rotterdamaj esp-istoj kun kanto sur la lipoj helpis en liberaj horoj al plibeligo de la nova oficejo. Nova administrantino de la Asocio estas s-ino M. H. Vermaas.

Laŭ komuniko de la estraro de UEA kredeble atingos en tia ĉi jaro 20.000 membrojn./rim.de red: jam superis ĝin./ Tie montras la kontentecon de la Esperantistaro pro la laboro de la lastjaraj atingaj

de la Asocio.

Ĉie estas rimarkebla nova entuziasmo kiu animas la laboron. UEA sukcese agas por Esperanto. La gvidaj instancoj de la Asocio plenumas kaj plenumos sian devon. Ĉiu esperantistofaru la sian.
/Laŭ "Esperanto" n-ro 11/.

Rossetti kaj ĉs. esperantistoj.

La fama poeto kaj verkisto Esperanta Reto Rossetti skribis al nia ĉefdelegito i.a.:

"...La vigleca kaj kuraĝa entreprenemo de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas fenomeno tre fierinda. Ĉe vi kuŝas granda parto de la mondelito de nia afero, kaj mi kore esperas, ke cirkonstancoj baldaŭ ebligos al vi fari vian plenan kaj tre gravan kontribuon al nia tutmonda pacmovado."
Ni forte klopodu meriti la alte laŭdajn vortojn!

Historio de la Esperanto Movado

Al la multaj interesiĝantoj pri tiu ĉi studhelpilo uzita en SET 1955, ni sciigas, ke ni laŭpove multobligos ĝin. Nia komunikado servu kiel respondo ankaŭ al tiuj, kiuj skribis al J.Mařík en tiu ĉi afero.

Eluzu servon de TKKE

Ĉu via rondeto baraktas kontraŭ malkompreno aŭ neamika sinteno de via ZK kaj OB? Ĉu vi bezonas intervenon en grava afero, minacanta vian ekziston? Turnu vin al TKKE pere de nia ĉefdelegito, junulara sekciestro de TKKE. Priskribu la kaŭzojn de tia sinteno. Tamen evitu ĝeni TKKE per malgravaj aferoj!

Helpu al Žďár!

La Junularo en Žďár n/Sáz. preparas ekspozicion por rebati malfavoran artikoleon de "Žďár Vysočiny". Helpu per prunto de propra materialo (literaturo, gazetoj, infanaj desegnaĵoj k.a.)
Adreso: s-ano Gustav Kremláček, Stalingrad 15/3, Žďár n/Sáz.

Regiona kunveno de Junularo en Brno.

okazos dimanĉe 12.2.1956, tradicia maskobalo sabaton 11.2-1956. Planu vian ĉeeston!

Malgranda busto de L.L.Zamenhof.

15 cm alta farita de majstro J. Paša, ricevebla! Ĝi estas taŭga ornamaĵo de loĝejo esperantista kaj konvena donaco por eksterlanda korespondanto. Mendu ĉe J. Šustr, Praha I., Dlouhá 10, antaŭmendinte la monon Kčs 30,--, plus Kčs 5,-- por poŝtelspezoj. Tie vi povas mendi ankaŭ la ĵus fabrikitajn belajn insignojn /ĉs. flago kun verda stelo/. Peco 4,- Kčs. /Indiku ĉu kun pinglo, broĉo, aŭ por butontruo./.

Urbo en Sovetunio kun Esperanta nomo

2.11.1955 la Moskva Radio elsendis /ĉeĥa,/ raporton pri la 30-jara jubileo da la fondigo de la komuna, nun industria urbo: Interhelpo, fondita de ĉeĥaj emigrintoj en 1925 en Soveta Kirgizio. /La esperantan nomon oni elektis por la fondita komuno ŝajne laŭ propono de esperantistoj inter la emigrintoj kaj ĝi estas laŭ la rusa skribmaniero! "Interhelpo", bone konata en Sovetunio.

UNO mendis la "Venditan fianĉinon" en Esperanto.

En la lasta numero ni informis pri surdiskigo de arioj el "Vendita fianĉino" en Esperanto. La 17-a

N-ro de "Heroldo de Esperanto", aperigis artikolon pri okazintaĵo kun foto de s-ano Ŝvehla, solisto de Regiona teatro en Olomouc, kiu kantis la ariojn. Nun ni sciigas ke la oficejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko kaj la pariza oficejo de UNESCO mendis (de Ĉs. gramofonuzinoj) sufiĉe grandan kvanton de tiu ĉi gramofondiskoj. - TKKE jam informis la Oficejon de la Respublika Prezidanto pri tiu ĉi faro de UNO kaj de UNESCO, kiu helpas al ldiskonigo de la ĉeĥoslovaka kulturo pere de Esperanto.

Jarkunveno de TEJO.

okazis 10.-11. de aŭgusto en L'Aquilla /Italio/. La tutmonda Esperanto-Junularorganizo akceptis novan statuton kaj elektis novan Estraron. Prezidante estas Heinrich Reiter /Austrio/, sekretario - Nikola Minnaja /Italio/. Kiel funkciula por Kultura Servo estis elektita s-ino Madelaine Haudebine (ŝin ni konas el nia jarkunveno!), kiu salutis la kunvenon en la nomo de la ĉs. esperantista junularo.

TEJO havas jenajn kategoriojn de membroj:

a/ aktivaj /14-30 jaroj/, b/ aspirantaj /6-14 j./

c/ denaskaj esperantistoj /de naskiĝo ĝis 6 jaroj/,

d/ subtenantaj /pli ol 30 jaroj/, e/ simpatiantaj.

Elektitoj por tiu funkcio en TEJO estas rigardataj kiel aktivaj membroj. En la Honora Tribunalo de TEJO kunsidas ankaŭ la konata vojaĝisto Tibor Sekelj.

TEJO-skisemajnoj estos aranĝitaj en decembro kaj januaro en la Salzburg-regiono.

Nia Voĉeto

estas titolo de Esperanta gazeto porinfana. Ĝi estas multobligita kaj ilustrita kaj aperas en Francio.

Anna Alamo

la fama sveda prelegistino ripozinte iom post sia vojaĝo en Jugoslavio, Grekujo kaj Turkujo, intencas reviziti Ĉeĥoslovakion en majo aŭ junio. Ĉiu, kiu konas tiun ĉi noblan esperantistinon kaj sinceran amikinson de nia popolo ĝojas revidi ŝin.

30 junaj anglaj esperantistoj

volas veni dum aŭgusto en Ĉeĥoslovakion sub gvido de lernejestro s-ano Williams. Ili estas lernantoj de la Egeton Park Lernejo en Danton apud Manchester, kiuj ĉiujare vizitas per sia aŭtobuso iun el eŭropaj landoj. Iliaj spertoj pri la praktika valoro de Esperanto kaj pri esperantista solidareco en la diversaj landoj estas mirindaj!

La decembra Zamenhofa vespero en Praha

preparita de la Verda Ĉaro de J. Baghy, denove donis artan ĝuon al la ĉeestantoj. En la unuakta dramo "Ombroj" kaj en parto el la dramo „La patrino" de K. Čapek ludis Suchardová, Seeman, Rejtkarková, Slanina, Novobilský.

Japonŝti vĉdci pro esperanto.

Podepsaní uznávají, že zavedení esperanta jako společného jazyka, zveřejňování prací jest velmi účinným prostředkem k solidarizaci mezinárodní spolupráoe vědců.

/Z resoluce, podepsané 85 japonskými vědci r. 1950/.

Ni aŭdis

...Ke kurioza aventuro renkontis s-anon Evoto, unu el konataj esperantistoj de Slovakio, dum lia somera vojaĝo en Bulgario. Evoto konversaciis kun bulgara esperantisto en ŝipo sur Nigra maro,

dum iu sinjorino de apuda tablo fikse rigardis lian verdan stelon. Fine la sinjorino alparolis Evoton en Esperanto: "Ĉu vi parolas Esperante?" Sed montriĝis, ke ŝia aktiva scio de Esperanto ne sufiĉis por interkompreniĝo. Evoto do komencis angle, sed ŝi komprenis preskaŭ nenion. La sinjorino ŝajnis al Evoto, strange, iomete konata. Li do uzis la lastan eblecon kaj demandis ŝin - slovake. Kaj mirinde! Ŝi respondis en la ĉeĥa! La lasta baro tuj falis. "Mi estas Evoto el M!"

"Kaj mi estas Švábiková-Kožíková el Praha, aktorino!"

Kia hazardo! Sur la Nigra maro renkontiĝi kun la iama fama aktorino de la Verda stacio, edzino de la konata aŭtoro de „Největší z pierotů“! Sed ĝi ne estas ĉio: kun ŝi libertempis en Bulgario aliaj famaj verdstacianoj: Karel Höger, nun membro de la Nacia teatro en Praha, kaj la ĉefreĝisoro de la ĉs. radio, Bezdíček.

Ĉu la mondo ne estas malgranda?

/Ankaŭ nia regiona peranto s-ano Libor Křivánek el Písek libertempis en Bulgario. Ĉu ni aŭdos de li ion pri lia vojaĝo?/

...Ke en Francio estis eldonita en septembro 1955 unua numero de la nova literatura organo por nia movado. Ĝia nomo estas: La nica literatura revue, formato 13,5 x 18,3 cm, aperas dumonate.

Rigardante nomon de la ĉefredaktoro kaj nomojn de la redakta komitato ni konstatas, ke efektive eminentuloj de nia literaturo grupiĝis ĉe gvidilo de la nove naskita revuo: Gaston Waringhien /ĉefredaktoro/, Ivo Rotkvič, T. Pumpr, Raymond Schwartz, Reto Rossetti, Regulo Pérez, Roger Bernard.

Ni esperas, ke la revuo daŭrigos gloran vojon de Literatura Mondo, kiu trifoje ekbrilis, sed trifoje estis de ekonomiaj cirkonstancoj sufokita. Niajn esperojn pravigas enhavo de la numero kaj listo de la kontribuintoj: jen du poemoj de Kalocsay, sprita rakonto de Schwartz. Plue foliumante ni renkontas nomojn: Marjorie Boulton, Szilagyí, Rossetti, Auld, Waringhien. Sed grandan ĝojon ni eksentas legante tri ĉeĥajn nomojn: dro Pumpr, Jiří Kořínek kaj Miloš Lukáš, kiuj kontribuis per tradukoj el la ĉeĥa literaturo:

Koncize dirite: la enhavo estas alloga, sed la gazeto por ni bedaŭrinde nun neakirebla!

.. Ke jam tradicia Somera Eeperanto Tendaro Junulara okazos ĉi jare denove en la konata loko Silezia, en la valo de rivero Moravice apud Opava, kie jam trifoje sukcese Junulara SET okazis. Ĝi estos duetapa po 14 tagoj, verŝajne fine de julio kaj komence de aŭgusto. En unua etapo oni aranĝos 2-3 tagan aŭtokaran ekskurson tra tuta Silezio. Ĉu freŝa akvo, belaj arbaroj kaj herbejoj ne allogos ankaŭ vin por ĝin partopreni?

Gejunuloj, ankaŭ pliaĝuloj travivos tie momentojn neforgeseblajn. Medio tie reganta permesos forgesi al ĉiu la ĉiutagajn zorgojn kaj krome plialtigos la lingvoscion de la partoprenantoj. Venu, kaj priuĝu nian aranĝon junularan.

Precizajn informojn pri SET 1956 ni ĝustatempe sciigos al vi.

Jen eta bildo el la vivo de la tendaranoj ĉe studio kaj amuzo:



Legantoj skribas al ni

...Kun granda ĝojo mi ricevis vian gazeton. Dankon por ĝi. En Tagiĝo mi legis artikolon de Imre Ferenczy. Li estas mia kara aamideano kaj amiko. Mi tre ĝojas, ke li skribis al Tagiĝo, ke en Eszergomtábor fondiĝis Esperanto Junulara Rondo.

Bonvolu sciigi en Tagiĝo mian artikolon:

"Ni, junaj en Eszergomtábor decidis, ke ni organizos Esperantan rondon. Baldaŭ ni jam organizis membrojn kaj komencis lerni la Esperantan lingvon, ĉar tio estas bela kaj tre facila. La 11.12.57 ni kunvokis Esperantan kunvenon kaj aranĝis grandan ekspozicion. Ĝin vizitis multaj homoj. Ĉiuĵaŭde ni havas kunvenojn (kaj aranĝis grandan ekspozicion. Ĝin vizitis multaj homoj.) kaj ni lernas. Tibor Nagy parolis al ni pri literaturo de Ĉeĥoslovakio kaj pri Esperanto movado tie. Li legis al ni artikolojn el Tagiĝo."

Nia Esperanta rondo ŝatus, se ni ricevus junajn s-anojn el Ĉeĥoslovakio. Ni tre ŝatus korespondi kun ĉeĥaj samideanoj. Ĉu Tagiĝo povus akiri por ni amikojn? Ni estos dankemaj, se Tagiĝo plu donos instigojn al ni kaj al komencantaj rondoj.

Mi deziras bonan laboron kaj multan sukceson al vi kaj Tagiĝo.

Andor Laczko, Esztergomtábor Temesvári út 18, Hungario.

..La Hungarlanda Esp. Konsilantaro en la nomo de la hungaraj esp-istoj sendas tutkorajn salutojn al vi. - Ĝoje ni povas raporti al vi, ke la kuranta jaro ŝanĝiĝis je "Jaro de la ŝanĝo". Nia streĉita laboro ne estis senrezulta. La oficialaj opinioj ĉe la aŭtoritatoj sukcese ŝanĝiĝis. Nature tion ni povas danki pro la sukcesoj en Sovetunio kaj en ĉiuj popol-demokratiaj landoj rilate al Esperanto.

En kuranta jaro komenciĝis la vera printempo ĉe ni. Printempa Renkonto Esperanta donis la unuan impulson al la granda laboro. Pac-amika kunveno en provinco, en septembro. Landa Esp. Renkonto. Tiam estis fondata nia organo - la Hungarlanda Esperanto Konsilantaro. Ĝin jam aprobis la Centra Gvidantaro de la partio kaj sekve de tio la popolkleriga ministerio petis jam de ni laborprogramon kaj budĝetprojekton pro jaro 1956. Do ni esperas kaj - laborae pro tio, ke jaro 1956 alportu grandajn sukcesojn al ni.

Dum mallonga tempo gravaj sukcesaj okazintaĵoj pruvigas, ke la hungara esp. movado estas denove laborkapabla kaj entuziasme laboras. Funkcias sep esp. fakrondoj en popolklerigaj domoj kaj dekunu kursoj. Estas dum organizado pluen dekfakrondoj kaj kvin kursoj. Ili ĉiuj estas en oficiala popolkleriga organsistemo. Do la hungara Esp. movado denove floras kaj ĉiuj entuziasme laboras.

Pri samaj ĝojigaj okazintaĵoj ni povas legi ankaŭ en la popoldemokratiaj landoj, eĉ ankaŭ en la danubvalaj landoj. Do ni tiel opinias, ke estas la tempo, kiam ni povas jam ankaŭ persone rilati. Tial la 2-a Plenkunsido de Prezidantaro de la Hungarlanda Esperanta Konsilantaro unuanime akceptis la decidon por proponi organizi la II-an Danubvalan Esperanto Konferencon en jaro 1956 somere. Samtempe ni petas la ĉeĥoslovakajn s-anojn por organizi tiun konferencon kaj aamtempe la lokon ni proponas: Bratislava.

Laŭ nia opinio la sekvonta jaro nepre bezonigas, ke la esp-istoj de la danubvalaj ŝtatoj nepre renkontu kaj pritraktu siajn specialajn taskojn. Ni pensas ke nia propono estas realigebla kaj acptebla de vi. Bovnolu kontaktiĝi kun landa TKKE. Salutas vin: Lodoviko MARTON - Julio Baghy.

Leteroj de niaj legantoj - daŭrigo.

..kore mi salutas vin okaze de la nova jaro. Mi ricevadas en ordo viajn gazetojn, la ekzemplerojn de Tagiĝo. Mi estas kun ĝi tute kontente kaj mi ŝatus ke vi ĝin plu eldonadu.

Mi dezirus somere viziti vian landon, la Someran Esperanto-Tendaron, konatiĝi kun via esp. vivo, laboro, por ricevi personajn spertojn por la plua agado.

Do, ni laboru senlace, pacience kaj mi esperas, ke ni atingos la deziratajn sukcesojn.

Tutkore mi salutas vin

Imre Ferenczy.

org. sekretario de la Hungarlanda E-Konsilantaro.

..foje mi jam esprimis mian kontenton pri via cirkulero kaj mi esperas, ke mi havos la feliĉon ricevadi ĝin ankaŭ la kurantan 1956 jaron.

Antaŭ nelonge mi malfermis kurson de Esperanto por gelernantoj de la superaj klasoj de la superaj klasoj de la gimnazioj en urbo Goce Delĉev. La gekursanoj montras grandan intereson al nia kara lingvo. Laŭ la propono de la gekursanoj estis fondita junulara societo, kiu ricevis la nomon "Juneco" kaj estas la unua junulara societo esperantista en Bulgario.

Mi kiel respondeculo de la societa estas komisiita transdoni la salutojn k. la bondezirojn de la societanoj al la glora Ĉeĥoslovaka Esperanta Junularo, kiu ĉiam alte tenis kaj tenas la verdan standardon. Ni la bulgaraj junuloj, adeptoj de la internacia lingvo, multlilate instruas nin de niaj fratoj - la ĉeĥoslovakaj junuloj - esperantistoj. Ni kiel novaj societanoj deziras esti helpataj de vi, karaj ĉeĥoslovakaj fratoj. Tiucele sendadu al ni diversajn esperantaĵojn por kiuj ni anticipas

dankas. Ni deziras korespondadi kun vi pri ĉiaj temoj kaj interŝanĝi diversajn objektojn.

La 20an de marto nia societa aranĝos ekspozicion kaj letervesperon. Sendu amase leterojn, bildkartojn kaj aliajn esperantaĵojn al mia adreso:

Borislav Velev, str. "Stalin"5, Goce Delcev, Bulgario.

...tre ĝojigis min, ke nia grupo venkis en la I-a konkurso en Tagiĝo. Mi kalkulis ke ni povus esti kvaraj aŭ kvinaj, sed certe ne la unuaj. Mi deziras, ke tio estu instigo por malgrandaj grupoj kaj ekzemplo por pli fortaj grupoj. Kompreneble ankaŭ nuna konkurso ni volas ĉeesti. Ni klopodas konvinki eĉ tiujn niajn anojn, kiuj pensas, ke ili ne kapablas tion. Ili ĉeestu eĉ se ili faros erarojn. Per tio ja homo lernas kaj mi vidas kaj spertas, ke la homo kapablas multe, se io devigas lin. Pro tio mi ŝatas Tagiĝon kaj la konkursojn. En ĝi estas klare videbla bona junulara organizo kaj laboro...

Josef Hořejší, RD Plzeň

...kaj nun permesu al mi denove iomete kritiki. Koncerne vian cirkuleron Tagiĝo, mi jam pasintan fojon skribis al vi, ke mi estis kontenta kun ĝia vesto kaj kompreneble ankaŭ kun ĝia enhavo. La 28a n-ro estas laŭ aspekto iom pli malbona eĉ kelkloke malbone legebla, sed mi scias, ke certe ekzistas multaj kaŭzoj, kiuj eĉ ne estas konataj al ni, kiuj malpli beligas nian ŝatatan cirkuleron. Mi ne volas kulpi vin, sed mi nur deziras konstati la veron. Koncerne al la enhavo, mi diras, ke de tempo al tempo ĝi certe pliboniĝas. Ne nur laŭ mia opinio, sed ankaŭ de aliaj ges-anoj estas via cirkulero taksata kiel plej bona, kiu aperas en nia lando. Eĉ mi aŭdis junularan amikon s-anon Kořínek el Brno, kiu diris, ke via gazeto estas hodiaŭ plej bona kaj havas nur tre malmultajn erarojn (li opinias la gramatikajn). Ja ni ĉiuj gejunuloj fieras pro tio, ke ni venkis en la konkurenco kun pli spertaj malmultaj ges-anoj. Sed ni ne trofierigu kaj denove „kuraĝe antaŭen“ kiel skribis s-ano Mařík el Praha en Tagiĝo.

El la enhavo de Tagiĝo tre plaĉas al mi la artikoloj de s-ano Novobilský el Praha, kies konsiloj certe multe helpas al niaj junularaj rondoj. Ankaŭ tre utilaj estas la literaturkonkursoj. Mi firme kredas, ke similaj konkursoj helpas al kresko de novaj literaturistoj.

Nur daŭrigu similmaniere! kaj mi estas konvinkita, ke preskaŭ ĉiu bone amuziĝas, kiam legas la lastan paĝon de la cirkulero, nome la anoncojn. Same mi mem amuziĝis traleginte ilin. Sed mi dubas pri tio, ke la anoncoj devenas de tiuj, kiuj estas subskribitaj. Mi estas certigita, ke iu ŝercemulo faras tion je la konto de tiuj „kompatinduloj“. Sed tio ne gravas, almenaŭ mi tiel pensas. Precipe, ke la popolo amuziĝas. Mi nur bedaŭras, ke la cirkulero plu aperados dumonate kaj estos pli kosta. Mi jam pripensis la aferon, se ne povos iu alia helpi kaj mi ekmemoris ke eble Praha povus denove aperigi sian iaman cirkuleron VOKAS VIN PRAHA kaj eĉ mi aŭdis kelkajn voĉojn por tio, sed, bedaŭrinde, kelkaj ne konsentas kaj kelkaj ankaŭ dubas pri kunlaboro. Ekzistas la opinio, ke ĉion devus fari poste nur unu homo kaj la situacio povus esti preskaŭ la sama kiel ĉe vi. Sed mi pensas, ke oni ne devas timi. Ja en Praha ekzistas multaj spertuloj en tiu ĉi afero (Forman, Neumann, Novotný, Novobilský), kiuj jam redaktis cirkulerojn kaj aliaj, kiuj bone scias la lingvon kaj poste kelkaj literaturtalentoj (Mráz, Kudla, Novobilský) kaj fine mi aŭdis, ke s-ano Slanina ankaŭ proponis sian helpon en tiu ĉi sfero. Nu, mi jam lasos tiujn ĉi meditaciojn kaj mi esperas ke verŝajne iu konferenco solvos tiun ĉi problemon. Same malsama situacio estas en la nombro de la cirkuleroj. Ĉu ne sufiĉus unu cirkulero (ekz. Bulteno de klubo Praha) por Bohemio kaj Moravio kaj unu por Slovakio kaj fine unu centra por Junularo en tuta respubliko? Se ni nun havas pli multajn cirkulerojn ni vane eluzas niajn fortojn, materialon (paperon, stencilojn k.s.) kaj la tempon, kiun ni povus eluzi pli utile en hodiaŭaj tempoj. La saman opinion havis ankaŭ s-ano Canko Murgin el Bulgario, kiu antaŭ la tempo vizitis nian landon.

Jarmila Lásková. - Praha
(rim. de redaktoro:- letero pripensinda)

Rimportreto



Pepek, miriga organiz-talento,
de l' tri tendaroj sperta direktor',
del' grandaj agoj granda reĝisor'
neniam regata de sentimento!

Laŭdire puritana abstinento...
(murdisto fama ja del' vin', likvor',
Pepek, miriga organiz-talento
de l' tri tendaroj sperta direktor'!

Virinon kvankam nomas li serpento,
del' amo tamen flagras meteor',
en lia juna kor'. (Sen metafor'!!)
Sekrete iĝos edzo en advento
Pepek, miriga organiz-talento!

- Atair -
el "Siluetoj"

Josef Solnický, nask. en jaro 1931, estas membro de la Junularo-grupo en Opava. Grandajn meritojn li gajnis pro zorgolena organizo de nova eduka formo, nome Somera Esperanto Tendaro en naturo, kaj pro kelkaj tre sukcesaj ekspozicioj aranĝitaj en Opava,---

Tagiĝo informas

Redaktejo de Tagiĝo sciigas, ke cirkulero estos eldonata tiamaniere:

4 foje dum jaro en maniero de preso sur rotaprint en bela ekipo kaj ampleksa.

Krome estos eldonataj cirkuleroj multobligitaj laŭbezone, almenaŭ 5 foje dum jaro en amplekso 4-6 paĝoj, kie estos publikigataj raportoj pri la enlanda kaj eksterlanda Esperanto movado.

Pro tio estas necese, ke LD raportu ĉiumonate al RD pri la okazintaĵoj en la grupo. (Raporto atingu la RD ĉiam la 7-an en la nova monato). RD raportu pri la agado en regiono nur al ĈD s-ano Mařík kaj al la grupoj en la regiono plej malfrue la 20-an en la monato.

Artikolojn aŭ aliajn kontribuojn por venonta Tagiĝo vi sendu plej malfrue la 23-an de februaro. Tagiĝo multobligita aperos la 7-an de marto.

Ampleksa eldono estos presata meze de majo, fine de aŭgusto, kaj fine de novembro. Kontribuojn por tiuj eldonoj ni bezonas almenaŭ 3 samajnoj antaŭe.

TAGIĜO.

Mi petas ĉiujn korespondantojn pardoni al mi, ke mi ne povas respondi ĉiun vian leteron pro tromulto da laboro en la oficejo. Tamen mi klopodos respondi gravajn aferojn en Tagiĝo. Pri ĉiu organiza afero vin turnu al: s-ano Mařík, Jar., Malá Štěpánská 9, Praha II, aŭ plej bone al via regiona delegito.

Por via afabla kompreno dankas al vi

Vorta piedpilkludo

Societa ludo por komencantoj. Gvidanto de ludo ordonos al ĉiuj, ke ili skribu jenajn tri frazojn:

1/ Kion mi faras

2/ Per kio

3/ Kie

Nun li mallaŭte flustros al ĉiu lernanto aparte alian verbon; ekzemple: ami, labori, skribi, ktp. Ricevitan verbon notos lernanto al unua frazo. Poste gvidanto denove flustre diros al ĉiu ian ilon, ekzemple: fosilo, martelo, lango ktp. Lernanto notos vorton al dua frazo. Kaj nun gvidanto flustre diros al ĉiu lernanto ian lokon, ekzemple: placo, fabriko, lito. Post ĝia noto ĉiu lernanto laŭte tralegos tutan frazon kiu povas esti:

"Mi laboras per lango en lito".

Multe da sukceso

Dr.

Ni kantu

Ĉu plaĉas al vi nova vigl kaj bela kanto?

Ni esperas, ke jes. Nur provu en ĉiu grupo ellerni ĝin. Ĝi helpas pligajigi vian programon. Vortojn akomodis el la angla verso s-ano Pumpr kaj muzikon komponis nia jam fama juna komponisto Radim K u d l a.

La kanto flugu tra tuta Junularo en Ĉeĥoslovakio, kaj ankaŭ en aliaj landoj. Skribu kiel ĝi plaĉas al vi.

NIA STANDARDO

dr. Pumpr – M.A.

Vivgaje

NIA STANDARDO
Vivgaje

dr. Pumpr - M.A.

Se karavans rim pinte tempo al la corno de sono, se aŭtura blova vento anŭ al
vinta blinta la' flinta sub la fono, la standardo de l'espero, la standardo de l'espero. Ni
Eiel avangardo la dragono de l' standardo kun filo kaj la' ardo sekvo al la
cel', ni ardo sekvo al la cel'.

- 1/ Se karesas nin printempo aŭ la suno de somer',
se aŭtuna blovas vento aŭ se vintre blankas ter',
flirtas sub la firmamento /:La standardo de l' esper':/
Ni kie avangarda la drapon de l' atandardo
kun fido kaj kor-ardo sekvu al la cel'.
- 2/ Se pro malkompren' de l' mondo tremas kor' en malkviet'
se ne klaras horizonto, nek vidiĝas sav-rimed',
montras vojon al estonto: /:la simbol' de nia kred':/
Ni kiel avangardo la drapon de l' standardo
kun fido kaj kor-ardo sekvu sen retret'!
- 3/ Ke la venko veni devas, ke ĝi baldaŭ venos jam,
firme kredas, ne nur revas, ĉiu nia samcelan'.
Kaj ni la standardon levas, /signon de la frata am':/
Ni kiel avangardo la drapon de l' standardo
kun fido kaj kor-ardo sekvu man 'en man'.

La junulara konkurso

Rezultoj de la II-a konkurso:

Originalaj verkoj: I. Jan Werner (Brno) 2. Fr. Březina, 3. B. Kremláčková (Žďár n/Sáz.),
4. M. Matušková (Opava)

Krome partoprenis: Ges-anoj: K.Kraft (Obořiště), Vl. Novotný (Praha), G. Kremláček (Žďár), O. Schwetter (Havířov), A.Chrápavý (Ostrava), Tichý (Svitavy), Rejthárková (Hradec Králové), Z. Hršel (Hr.Kr.), Düreová, Suchý (Žďár), Rybáčková, Franc, Štechr, Mišková, Vašáková (Pardubice), Kremláček K. (Žďár), Dr. Kočvara, Adámek (Ostrava), Šloufová, Zýková, Kulíšek, Ing. Julmanic, Šťastný, Hořejší (Plzeň), Cink, Kořínková, Lorková (Brno).

T r a d u k o j: 1. A. Veselá (Praha), 2. Schwetter (Havířov), 3. Kremláčková (Žďár)

Krome partoprenis: Kraft, Březina, Mráz, G. Kremláček, Rejthárková, Matušková, Düreová, Tichý, Suchý, Novotný, Hršel, Cink, Kořínková, Podhradská, Rybová, Novotná, Kaláb, Lorková, Hořejší, Kulíšková, Šťastný, Ing. Julmanic, Kulíšek, Zýka, Zýková, Šloufová, Fojtíková, Dr. Caklová, Mišková, Franc, Štechr, Jirečková, Valjan.

Pro tro malfrua sendo de la taskoj ni ne povis ĉion plej juste pritaksi. Bonvolu do atenti la datumon. Taskon por la nova konkurso ellaboru kaj forsendu al Novobilský Vlastimil, Praha 3, Újezd 11, plej m a l f r u e la 20. de MARTO 1956. Ne forgesu kaj partoprenu en ĝi!!!

Kelkaj rimarkoj el la II-a konkurso:

La originalan parton de la konkurso partoprenis 30 gesamideanoj. Kredu, karaj geamikoj, ke tre malfacile mi povis elekti la plej bonajn tekstojn, ĉar ĉiuj meritis atenton kaj laŭdon. Miriga afero, simplaj 10 vortoj - kaj kiom da gajaj aŭ tragediaj aventuroj mi travivis en viaj rakontoj:

Jen delikatsenta rakonto "La cirko" de s. Kremláčková, malkovranta antaŭ ni oftan tragediojn de cirka medio, jen spritaj poemoj de s. Rejthárková kaj s. Zd. Hršel. „Mia kara“ nomiĝas amletero de Anjo (K. Kraft) en kiu ŝi edukas sian knabon. S. Kremláček pruvis sian rakontistan talenton per la rakonto "Kiam la hirundoj migras" ..., kiun ni elektis kiel traduktekston por nia III. konkurso (en la ĉeĥa lingvo). La Konkursan sonĝon de s-ano Březina vi povas legi mem! "Silvestra meditado" de s. Matušková portas apartajn kaj pensigajn problemojn. Interesaj estas rakontoj de s-ano Chrápavý, "Ĉu vi kredas" de s. Novotný kaj rakonto "Paca kongreso" de ges. Düreová-Suchý.

Mi aprezis la taskoj precipe el vidpunkto lingva, kompreneble ne malatentante la enhavon. La rezulton vidu sur antaŭa paĝo.

Tradukoj: ĉiuj tradukoj estis ĝenerale bonaj. Partoprenis 36 ges-anoj. Vi ĉiuj klopodis traduki la fragmenton precipe precize: rezulte vi kelkfoje malatentis ĝustan spiriton de la ĉeĥa lingvo! Pro la spacmanko ni la ĝustan tradukon ne represas. Nur unu erareto en ĉiuj taskoj aperadis: Via „Zlatý kapr " estas "Delfín".

Apartan ĝojon kaŭzis al ni ges-anoj el Žďár, kies kontribuaĵoj estis plej multaj kaj plej kvalitaj.

GRATULON!

III. KONKURSO

Traduku en Esperanto jenan rakonton de s-ano G. Kremláček (Žďár n/Sáz.)

Ia parto de traduko

Když vlašťovky táhnou

Oči všech posluchačů spočívaly na tváři vypravěče. A není divu, neboť starý Gunvor Larsen dovede vyprávět jako málokdo jiný. Vždyť za pět desetiletí lehkomyšlných toulek po zeměkouli již člověk leccos zažije a uvidí, pozná svět od Londýna až po Tahiti, od Aljašky až po Ohňovou zemi, zná stejně dobře nejzapadlejší uličku v Šanhaji jako obrovské mrakodrapy v Novém Yorku, zná chuť vůně tropů právě tak jako chlad moře při polárním kruhu. Kolikrát již vyprávěl Larsen o tom, jak ujel ve svých čtrnácti letech z domova na zámožném parníku, kolik posluchačů již pobavil vyprávěním o lovu velryb a kolikrát již prožíval opětně ve svých vyprávěních hrozná dobrodružství mezi domomodci v Africe. A těžko by našel prostředí, v němž se Larsen nepohyboval. Žil mezi lovci v kanadských pustinách, dostal se do společnosti obchodních podnikatelů, průmyslníků a vyslanců, aby ihned na to odmítl všechny šance, je mu život nabízel a hnal se dále za dobrodružstvím a pochybným štěstím.

O tom všem Larsen rád vypravoval a našel vždy mnoho vděčných posluchačů. Ale o čem hovoří dnes? Proč nevidíš jako obvykle na tvářích posluchačů veselost nad bujností příběhu, proč na nich nepozoruješ napětí a nedočkavost konce dobrodružného vyprávění? Oči naplněné soucitem provázejí Larsenovo vyprávění o tom, jak kdysi, již před mnoha lety našel na okraji jihoamerického města vyčerpané tělíčko malého chlapce, jak jej vezl najatým autem do svého dočasného bytu, kde o něho pečoval jak o své vlastní dítě a když přes všechno úsilí lékaře podlehl hoch zápalu mozkových blan jak byl jediným účastníkem pohřbu, snad nejsmutnějšího a nejdojemnějšího, na jaký se kdy nebe dívalo. Kde se vzalo najednou v tom starém tuláku a dobrodruhu tolik citu, proč otvírá najednou své srdce, v němž, jak se zdálo dosud, nebylo nikdy místa pro soucit, intimní vztahy a sentimentalitu? - Posluchači náhle ani nevědí, jak by reagovali na nezvyklé vypravování. Jindy byla povídka provázena veselým smíchem, vtipnými poznámkami, po jejím dokončení se na vypravěče vždy nahrnulo mnoho otázek, které dnes schází, všichni jsou v rozpacích, poněvadž tuší, že se v duši Larsenově něco děje. I Žirafa, dívka, která získala tuto přezdívku pro svůj nezvykle dlouhý krk, pohlédne občas na Larsena, kterého zná od doby, kdy se usadil v přístavu. Ovšem, tehdy to byl jiný Larsen. Jak dovede těch pohých pět let změnit člověka. Statná postava se přihrbí, bystré lišácké oči ztratí svůj lesk a šibalství z nich je vytlačeno tesknou. A snad je to i ten smutek v očích Larsenových, který vzal všechna slova se rtů posluchačům, kteří pomalu vycházejí ven do slunného jarního odpoledne.

Kdybys šel za hodinu po přístavní hrázi, viděl bys stát u zábradlí postavu Larsenovu. Pouze roentgenem lidských myšlenek bys mohl prosvítiti jeho nitro. A viděl bys spokojenost nad vyhraným životem? Vždyť tento tulák bral s otevřenou náručí radosti, které mu svět nabízel. Kolik však ideálů nechal minouti lehkomyšlně kolem sebe. Kolik ideálů, které by se mohly státí náplní jeho života a mízou života druhých, proběhlo mu pod rukama, aniž by jím byly uchopeny nebo alespoň povšimnuty. Byly to pravděpodobně promarněné životní příležitosti, které před ním

defilovaly při pohledu na horizont moře.

A náhle patří jeho laskavé pohledy vlaštvkám, táhnoucím na jarním nebi, jakoby po nich posílal pozdravy do vzdálené země jezer a sněhu, která mu sice dala život, ale nic od něho nedostala, do země, kterou sice nazývá svou otčinou, ale zná ji pouze ve vzpomínkách na svá chlapecká léta.

Skloněnou postavu, s hlavou sraženou mezi širokými rameny vidíš odcházet od přístavní hráze. Odcházet od moře, které kdysi pro něho znamenalo život, dobrodružství a dnes jakoby v něm hledal své dávné sny a iluze.

II. parto originale

Neeble! Ĉu tio vere okazis? Jes!

Venis merkreda vespero. En la salono premiĝas amaso da novaj adeptoj de nia lingvo. Hodiaŭ oni malfermas komenculan kurson. La instruisto estas hodiaŭ en eksterordinare bona humoro (ĉar - jen, kiom da belaj fraŭlinoj ĉeeatas) kaj komencas la inaŭguran alparolon:

"Karaj geamikoj! Nur mallonge mi volas konatigi vin kun tiu mirindaĵo, kiu estas nia amegata lingvo Esperanto. Ĝi estas himno de l' estonta homaro, ĝi estas mistera eliksiro, arde flagranta aŭroro de la amo..." revas la kursestro, sed tuj transiras al la realeco:

"Per Esperanto vi povas akiri grandajn riĉaĵojn! se ne hodiaŭ - morgaŭ! Esp. oni parolas jam preskaŭ ĉie en la mondo; estis pruvite, ke eĉ aŭstraliaj indiĝenoj ŝatas nian lingvon kaj uzas ĝin por siaj religiaj ritoj. Vere milionoj kaj milionoj parolas ĝin kaj eble jam postmorgaŭ ĝi estos enkondukita de la Unuiĝintaj nacioj kaj UNESCO en ĉiujn lernejojn de la mondo.

Sed krom tio Esperanto havas riĉan literaturon tradukitan kaj originalan. Ekzemple Zamenhof jam antaŭ cent jaroj verkis fame konatan Hamleton kaj Revizoron por manifesti kapablojn de Esperanto.

Kiel ampleksan historian verkon skribis ekzemple Ludoviko Schwartz el Usono kaj nomis ĝin "Dia komedio de Dante"!

Vere neelĉerpebla estas fonto de nia literaturo! Unuvorte ĉion vi trovos en Esperanto: Amuzon, monon - eĉ edzinon!" (granda moviĝo inter maljunaj fraŭlinoj!!)

Tiel la kurso komenciĝis - KIU PRISKRIBOS ĜIAN FINON KAJ REZULTON?

III-a PARTO – originala

Solvu krucenigmon kiun al ni sendis s-ano Oldřich Schwetter (Havířov). Vi konstatos, ke ĝi iel rilatas al nia II-a konkurso. B o n a n a m u z o n !

Atentigo: (r) - skribu sole radikon de la vorto
(anagr.) - la vorton skribu anagrame /přesmyčka/
(male) - la vorton skribu male
(r-male) - la radikon de la vorto skribu male



Horizontale:

1. homo komisiita en eksterlando per reprezentado de sia ŝtato (r) ano de la homaro. 2. konkordeco (r), frakcio (r), hinda dolĉa ter-porno (r-male). 3. konsonanto, enlandulo (male), prefikso (male). 4. finaĵo de futura pasiva participo (r), nedifina pronomo, diboĉi, finaĵo de substantivo. 5. fino de ŝakludo (r), altpreza metalo, aerostato (male), 6. natura akvujo (male), ĉiu homo havas ĝin diversalta, kreskaĵo (r), 7. konsonanto, interjekcio esprimanta ridon, virina movado defendanta egalrajtecon virinoj kun viroj. 8. farigi, kontraŭon de malbono, vokaloj de temo, sufikso esprimanta inklinon (r). 9. ano de soveta nacio, orientana pastro (r-male),

finaĵo de futura pasiva participo. 10. trafikilo mara eĉ rivera (male), aliepeca (r).

Vertikale:

A. transportilo. B. konsonantoj de mino, kontraŭo de nokto (r), ŝtelanta birdo (r-male), C. naĝobarelo, insuloj de Pacifiko, D. azeno sen Zo, artikolo, roma kvino antaŭ Ŝo. E. teatroludejo, fari truon (r). F. unua litero de alfabeto, besto kun longa kolo, finaĵo de substantivo. G. dio (anagr.) vintra kovrilo (male), konsonanto, H. elstaraĵo sur akvonivelo, signo de la plej bonaj svissaj horloĝoj. I. konsonanto, mallongigo de numero, finaĵo de infinitivo, patro da mia patro (r). J. malsano de meningo (r-male). K. interjekcio esprimanta ridon, lando de greka nacio, finaĵo de adjektivo. L. kantisto kantanta sola (male), vorteto uzata kiam oni komparacias, M. nedifina pronomo adverbo (male), aldoni. N. terura armilo (male), ĝi estigas inter junaj homoj (male).

REGIONAJ DELEGITOJ INSTIGU LA GRUPOJN POR PARTOPRENI LA KONKURSONIII
El la pasinta konkurso ni publikigas unu taskon, kiun verkis s-ano Březina el Žďár:

Konkursa sonĝo

Kiam mia amiko Gusta tralegis al mi novajn taskojn por nia konkurso, mi ege maltrankviliĝis, ĉar mi tuj tute klare sentis, ke mi ne estos ree kapabla skribi ion almenaŭ mezkvalitan. Mi devas konfesi, ke dum la posta instruado mi jam ne povis plene koncentriĝi. Destinitaj vortoj: ambasadoro, baleno, Tahiti ktp. svarmis en mia kapo kaj ĉiam denove kontraŭ mia volo penetris ĝin. Kiel kunartikigi ĉi tiujn vortojn en kompaktan tutajon? Tio estas demando je kiu mi neniam trovos kontentigan respondon. Vermo de malkontenteco komencis sian laboron.

Kiam post la instruado mi iris hejmen, blovis malvarma vento, kiu kraĉis en mian vizaĝon malsekan NEĜON, mia malkontenteco ankoraŭ pligrandiĝis kaj kiam preter veturanta AŬTOMOBILo ŝprucmalpurigis min per fiodoranta koto, tiam mia humoro malleviĝis profunden sub la nulon. Alveninte hejmen mi rifuzis vespermanĝi kaj kontraŭ la kutimo kaj enlitiĝis, esperante trovi konsolon kaj forgeson en ĉionsaniga dormo. Sed "ve!", kiel naivaj estis miaj esperoj. Mi turniĝadis de flanko al flanko kaj mia kapo estis kiel en fajro. Fiksita vortoj nun senĉese atakis mian cerbon, vipis kaj rodis ĝin kaj la konscio de malkapableco piedfrapis mian menson. "Ho Dio pardonu al nia kultura delegito, ĉar li ne solis kion li kaŭzos!"

Longe, tre longe daŭris la batalo de korpa laciĝo kontraŭ vortaj inkuboj, sed fine mi tamen dronis en profundaĵo de la dormo.

La flugiloj de la sonĝo transportis min sur ferdekon de fiŝkaptista VAPORŜIPO. Songe mi estis unu el fiŝkaptistoj, kiuj ĝue tiris grandan BALENON per la veste sur la ferdekon. Vere knabega sporto, tiamaniere kapti la fiŝojn. En la momento, kiam la baleno propraforte ĵetis sian kapon sur la ferdekrandon, ni forsaltis kaj mi ekrimarkis, ke nia ŝipo ne troviĝas sur la maro, sed sur iu grandega LAGO. Ĝi ĵus direktiĝis en mallarĝan golfon. Mi jam klare vidis ankaŭ bordon. Unu indiĝeno jam atendis min kaj volis min gvidi al la fajro. "Lasu min!" Mi ekkriis. "Mi ja ne estas blinda kaj povas iri mem!" Nun nur mi turniĝis reen, por vidi la tutan golfon. La golfo ŝajnis al mi iel konata. "Jes, jes," mi diris ĝoje kaj surprizite. „Tio estas ja Zátoka de Chvalatice kaj tiuj kantantaj indiĝenoj estas neniuj aliaj ol miaj verdaj tendaramikoj. Nu certe, nun mi jam povas distingi unuopajn voĉojn, kiuj plenforte kantas: „Alaŭdeto, juna alaŭdeto.” Ankaŭ mi kantas kaj ĝojas. La kanto finiĝis. Iu voĉo krias: "Drahuŝ alveturas!" Nun mi vidas nenion. Mi streĉe aŭskultas, sed krom la stranga sono, kiu tute ne similas al motociklo mi aŭdas nenion. Stranga sono plifortiĝas. Ho terure! Mi jam vidas. Grandega longkola ĜIRAFO alproksimiĝas kaj sur ĝia dorso sidas grimacanta Koĉvara. Ĉiuj amikoj subite malaparis, nur mi sidas kiel ligneza kaj tute ne povas moviĝi. Sovaĝa ĝirafino saltegas kaj mi rimarkas, ke ĝi estas pelata de lupoj. Sed ne, tio ne estas lupoj. Tio estas mia fidela gvidhundo "AMBASADORO". Pelata ĝirafino kuregas rekte al mi. Mi fermas okulojn kaj atendas la plej teruran finon. Subite la piedfrapo ĉesis. Miaj okuloj malfermiĝas kaj mi vidas samideanon Koĉvara starantan apud sia motociklo sur kies benzinujo oni ne povas legi

kutiman surskribon Jawa, sed grandajn literojn "TAHITI" . Drahuŝ ekfunkcias maŝinon, kiu farae inferan bruon. Ĉi tiu bruego vekas min sed kia miraklo? Bruo daŭras spite mian vekigo. "Mil diabloj!" Tio ne estas motociklo, sed mia vekhorloĝo, kiu vokas min en mondon de realaĵoj. Ŝvitita ĝis la lasta fadeno de mia negliĝo mi leviĝas. Mia kapo turniĝas kiel post la MENINGITO. Iom malbenante nian kulturalan delegiton, mi lavas min kaj post la matenmanĝo rapidas kun mis sonĝa "AMBASADORO " en muziklernejon.

Březina Fr. - ŽĎÁR

Ankoraŭ unu konkursan taskon ni publikigas. Nun ĝi estas poemo verkita de s-ano Werner el Brno.

Ragoa

En mondangulo fora,
en vaesa pacifika mar',
troviĝas fama insular',
kun logo sentamora.

Sur la insul TAHITI, sub ĉielo hele blua,
nun vivas sorĉa perlo de ĉi land':
knabin' Ragoa; jen ŝi sub girland'
de sia hejmo albambua.

Pri ŝia amo luktas multaj ,
ne sole belstatura indiĝen'
kun angla vid' kaj batalem',
sed ankaŭ blankaj viroj spurtaj.

AMBASADOR' blankhaŭta
kun Buic-AŬTOMOBIL'
kaj elokventa parol-stil'
mem rendevuas kun Ragoa dum parol' mallaŭta:

"Num vin mi volas porti kune
al maĵora LAG',
ĉar kvazaŭ brula sag'
vi vundis mian koron nune.

Ho mia am', Ragoa kara,
por vi misteras NEĜO-bril',
iru kun mi al Cortina d'Ampezzo mejlojn mil
per luksa VAPORŜIPO mara...

Aŭ tuj ni flugu per BALONO,
en mia poŝ' abundas mona or'!"
Sed sen resonado restis ŝia kor',
kaj sen kompreno lia parol-tone.

Terure! Venae la ĜIRAFO longakola
kaj for lin pelas sen respekto de blankula jur'.
Kaj fino! Antaŭ MENINGITO vanis kur',
des malpli la botel' da coca-cola.

Ragoa nun en ĉirkaŭpren' de INDIĜENO

ne plu dialogas pri perfida or',
sed en silento kor' ĉe kor',
nun ambaŭ revas pri komuna viv' sen ĝeno.

- Juano -

Literatura paĝo

Daŭrigante en la portret-serio de niaj eminentuloj ni volia konatigi vin hodiaŭ kun s-ano Jiří Kořínek el Brno, kies poezio tradukita kaj originala renkontis altan aprezon en la Belarta Konkurso de UEA pasintjare.

Lia poezio ne estas malkonata ĉe nia junularo; s-ano Kořínek mem estas bona amiko de la Junulara movado.

Natura inklino de ĉiu leganto estas, - ekscii ion pli proksiman, ion pli intiman pri sia aŭtoro. Nia kultura delegito, s-ano V. Novobilský per kelkaj demandoj intervjuis s-anon Kořínek kaj ni esperas, ke liaj respondoj efektive pliproksimigos al ni la personecon de nia poeto:

1. „Permesu estimata samideano, kelkajn demandojn pri via ĝisnuna vivo-vojo. Se vi ne kontraŭstarus, ni komencu de la naskiĝo.”

"Mi naskiĝis la 1-an de oktobro 1906 en Liberec en neriĉa familio. Mia patro estis tajloro. El la unua mondmilito li ne plu revenis kaj pri mi kaj la fratino zorgis la patrino laborante kiel kudristino. Pro monmanko mi interrompis la studadon de mezlernejo kaj ekpraktikis en pogrاندkomercejo per drapoj en Liberec. Ekde jaro 1928 mi estis vojaĝanta reprezentanto de pogrاندkomercejoj en Liberec kaj poste en Brno, kien mi transloĝiĝis en 1931. En 1938 mi edziĝis al Hilda Urbanová, kolegino en la sama entrepreno, kaj en 1940 naskiĝis al ni filino Věra. De 1940 ĝis 1948 ni havis propran negrandan teksvaran komercejon. De 1949 mi estas okupita kiel kvaltisto (kvalitkontrolisto) ĉe la Pogrاندkomercejo de Vestaf-varoj (BVOZ)."

2. "Inter la menciitaj datoj mankas tiu de via esperantigo!?"

"Esperanton mi eklernis kiel skolto en jaro 1921 de Lila Tomsová en Liberec. Sed la skolta kurseto baldaŭ disfalis. Post pli ol unu jaro mi retrovis la kajeron kun la komenco de Esperanto-studo. Mi eklernis tiam fervorege aŭtodidakte kaj vere post 3 monatoj mi sciis relative bone la lingvon. Mi aliĝis al ĉeĥa esperantista rondeto "Estonteco" en Liberec, kies prezidanto estis bona samideano fervojrevizoro Haase. Inter la anoj estis Knížek, Novotný, David, kaj iun tempon prof. Miloš Lukáš. Ni entreprenadis kumunajn ekskursojn en la belan ĉirkaŭaĵon en Liberec, babilis tutan tagon Esperante kaj perfektigis. Ni vizitadis ankaŭ la grandan germanan klubon en ties luksa klubejo en Urstoffhalle. El ties gvidantoj mi menciis prof. ing. Schloze, instr. Hübner, arkitekton Gahler, Michalík kaj aliajn. Se pro la fakto ke mi preskaŭ tutan jaron estis dumvojaĝe, mi tre neregule partoprenis en kluba vivo. Tiam mi okupiĝis per Esperanta literaturo nur pasive, precipe legante.

Nur post la dua mondmilito, loĝante en Brno kun modela kaj vigla klubo stirata de senlaca s-ano Vondroušek, mi ree ekaktivis en la kluba vivo."

3. "Nun ni transiru al la literaturo. De kiam datiĝas via poezia debuto?"

Ekde 1946 mi komencis ankaŭ okupiĝi per Esperanta literaturo aktive. Precipe min allogis poezie, al kiu mi inklinis ekde junaĝo. Mi tradukadis kaj verkis ankaŭ originale. Por la klubaj solenaj artvesperoj kaj koncertoj mi komencis tradukadi en kunlaboro kun prof. V. Scheiber klasikajn kantojn, ariojn kaj duetojn. Mi taksas la rikolton de tiuj 9 jaroj proksimume: pli ol 200 originalaj versaĵoj kaj ĉ. 200 tradukoj de poemoj kaj muzikaj tekstoj. Antaŭ 2 jaroj mi tradukis ankaŭ poemaron de K.V.Rais eldonitan kiel porinfanan libron sub titolo "Bestetoj kaj homoj" kun ilustraĵoj de Jiří Trnka. Tamen mia ŝatata aŭtoro estas Jar. Seifert, de kiu mi jam plurajn poemojn

tradukis kaj intencas fini la kolekton PANJO. La laboro super Jakobeno de Dvořák estaa preta ĝis unua triono kaj provizore interrompita pro aliaj laboroj.

4. "Via Esperanto estas moderna. Kiu poezia skolo pleje influis vin?"

En poezia skolo mi adoptiĝis al Kalocsaya grupo, kiu prenis en sian emblemon lingvan riĉecon. Esperanto posedu riĉajn sinonimojn kaj nuanc-vortojn kiel la vastevoluintaj naciaj lingvoj. Kie sentebblas manko oni ne timu neologismon. Tamen mi mem ne kovis neologismojn nek ilin uzadis senpripense. Esperanto de morgaŭ bezonos novajn vortojn apud la estantaj, sed ĝi ne ekstermos la malnovajn. Apud tia „frida, kurta, dura" plu vivos la solidaj civilaj formoj malvarma, malmola, mallonga. Sed la lingvo, precipe la poezia ne preteratentos formojn kiel malfrida, malkurta, maldura. Multaj ĉiuspecaj fakvortoj transiros en la komunuzan lingvon kaj la riĉigo plivalorigos Esperanton, prenante nenion el ĝia simpleco kaj reguleco. Jen mia opinio. Kiu tradukas poezion, kantojn kaj lirike riĉan beletran prozon ekkonas, kie alkreskos estonte la freŝa, limfoza frondaro de la lingvo."

Jen, vi diris multon interesan al ni. Mi dankas! Precipe via lasta respondo estas pripensinda.

La junularo deziras al vi daŭrajn sukcesojn en via laboro. Baldaŭ venu la tempo, kiam viaj verkoj aperos libroforme!

o O o

Organizaj raportoj

Kiu interesiĝas pri la Bulteno de Bulgara Esp. Asocio aŭ pri bulteno de Pola Esperanta Asocio, povas antaŭpagi ĉe ni Kĉs 12,-. - Ni prizorgos la sendadon rekte al vi (pere de interŝanĝo por nia cirkulero, kiun ni sendados al s-anoj en Bulgario kaj en Pollando). Klare notu la adreson, kien ĝin direkti kaj tion, ke vi antaŭpagas la Bultenon de BEA aŭ PEA. **ALIĜU MULTAJ!!**

Dume aliĝis kiel abonantoj por Tagiĝo (pagintaj) 180 gesamideanoj. La nombro estas ankoraŭ nesufiĉa, estas necese varbi pluajn abonantojn.. Alie ni ne povus eldoni venontajn numerojn presitajn. Por ĉiu via helpo dankon

Via TAGIĜO.

NIA CELO 400 TAGIĜOABONAONTOJ

Helpu en varbado!

Al ĉiuj junularaj grupoj ni sciigas, ke baldaŭ ni forsendos al ili kelkajn ekzemplerojn de ekzamenaj demandoj por la finstudintoj de kursoj por kategorioj A-D.

La demandaro estos preta eble fine de februaro kaj ni dissendos ĝin eble kune kun venonta numero de Tagiĝo. Grupoj aŭ izoluloj kiuj bezonos pliajn ekzemplerojn – skribu!

Demandaron kompilis kaj proponis s-ano Mařík.

Deziras korespondi

De Junulara grupo el Bulgario el urbo Goce Delĉev ni ricevis kelkajn adresojn de knabinoj kaj unu knabo, ĉiuj 17-aĝaj, kiuj tre volonte ekkorespondus kun gejunuloj el ĉiuj landoj pri kiu ajn temo.

Ni alvokas ĉefe la Junularon en Ĉeĥoslovakio skribi al ili kaj tiel ligi la novan amikecon inter Junularo Bulgara kaj Ĉeĥoslovaka, interŝanĝi spertojn en la poresperanta laboro ktp.

Jen iliaj adresoj:

1. Lilia Pramatarska, str. "Mesta" N-ro 1
 2. Cvetana Sotirova, str. "Dame Gruev" 3
 3. Luiza Stojanova, str. "Ŝar-planina" 1
 4. Evgenia Valeva, str. "A. Uzunov" 1
 5. Blagodata Maĉeva, str. "Stambolijskij 29
 6. Marie Spasova, str. "G. Dimitrov" 51
 7. Tatjana Mihajlova, str. "Oteo Paisij" 3
 8. Violeta Anaetasova, str. "Drama" 18
 9. Vera Markóva, str. "Vardar " 12
 10. Blaga Bakalĉeva, str. "G. Dimitrov"
 11. Konstadin Pandev, str. Odrin 9
- ĉiuj el GOCE DELĈEV, B u l g a r i o.

Rido sanigas

La tagmanĝo sukcesis eminente.

/Familiara informeto./

Rilate al nia lastnumera sciigo koncerne la ekzamenon pri la kuirarto de nia centrejano V. Novobilský, ni devas honeste konfesi, ke nia antaŭtimo estis senbaza. La nomito sukcesis vere eminente, pri kio atestas la seso da ĝuintoj. Marĝene ni povas aldoni, ke niaj Someraj tendaranoj ne nur havas kapablan literatur-instruiston sed, sed, ĉu eble? - oni ne plu devos zorgi pri ĉefkuiristo?

Al signo " Cikonieto" kaj „Kata ungego", kiuj sub tiaj pseŭdonimoj sendis al J.K. la avertajn antaŭedziĝajn admonojn kaj diversajn kalumniojn, mi sciigas, ke kompati ne necesas min eĉ ne la elektitan inon. - La sensenca, ofenda skribmaniero ĉefe de "Kata ungego" elvokas min al sanga duelo. Mi petas la lokon kaj horon, kiam ni ekbatalos. Armilon elektu vi. Nur armilon, kiu similas al akra virina lango mi rifuzas. Per ĝia vundiĝo ne fluas sango, sed n e r v o j.

Signo: „Venĝavida" .